

Promeno en la Esperanto-gazetaro
Iltis-Forumo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.11.30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Multaj gazetoj kaj revuoj regule atingas nin kaj dum kelkaj elsendoj ni dankos al ties redaktistoj per laŭtleĝo de kelkaj signifaj artikoloj.

A.- Unu el la dinamismaj esperanto-eldonejoj estas **Eldonejo Iltis** en Saarlando. Ĝis 1988 kun Sarlanda Esperanto-Ligo ĝi kuneldonis la organon **Dialogo**. Sed en 1989 naskiĝis sub la titolo **Iltis-Forumo** vere tre interesa **internacia literatura revuo** publikigita nur de Iltis-Eldonejo. Sub la titolo **Startas forumo** la **editorialo** tiel difinis la intencojn de la nova revuo:

Cl.- "La diversaj skoloj en la literatur-historio de Esperanto ĉiuj - se escepti la ĉiel esceptan Literaturan Mondon - suferis unu saman mankon: propran revuon, kie prezentiĝus ilia programo; specon de forumo, kie oni luktus por kaj kontraŭ la ideoj de tiu skolo. En la lastaj jaroj oni ekparolis pri la Iltisa Skolo kaj ties Literatura Manifesto de 1987. Multaj erare kredis, ke tiu skolo kvazaŭ identus kun Karolo Piĉ, aliaj, same erare - ĝin ligis kun la Neologisma Glosaro de Henri Vatré, kun la tradukoj kaj eseoj de Fernando de Diego, aŭ eĉ kun miaj propraj tradukoj el la germana beletro

A.- skribas Reinhard Haupenthal, kaj li daŭrigas:

Cl.- Kvankam fondita de mi jam en 1968, la eldonejo Arthur E. Iltis nur komence de 1989 plene mem-stariĝis kaj establiĝis kiel komerca entrepreno sendependa de esperantista organizaĵo. Tial mi opiniis utile, se ĝi disponus ankaŭ pri propra revuo kultura-literatura.

A.- Reinhard Haupenthal post listigo de la konsilontoj de la nova revuo, tiel difinas la programon de Iltis-Forumo:

Cl.- "Relevi el la kesto de forgeso tekstojn el malnovaj revuoj, kritike analizi tiujn revuojn mem, prezenti kolegojn-eldonistojn (se eble eĉ historiajn), restarigi antaŭ la nun-tempaj legantoj legendajn kaj legindajn aŭtorojn. Tamen, ni ne fuĝos en la paseon, sed nia kritika rigardo turniĝos kaj al la nuna situacio de nia literaturo, la libro-merkato kaj la situacio de la movado kiel tuta. Espereble en nia **FORUMO** iom post iom multiĝos la sagacaj kaj kritikaj voĉoj. Ni invitas la aŭtorojn kontribui, la legantojn abonon kaj rezoni.

A.- Antaŭ ni kuŝas la tri revunumeroj de 1989, la tri numeroj de 1990 kaj la unua de 1991 kaj nur la kovrilpaĝoj de tiuj 7 dikaj kajeroj jam instigas ĉiujn histori- kaj literatur-emulojn al esploro kaj frando de la enhavo. Tiuj kovril-paĝoj en si mem estas jam tuta programo. Ili prezentas la ĉisekvajn verkistojn:

Cl.- Henri Vatré, kiu fariĝis okdek-jara la 19-an de septembro 1988, Henry Jacob, ankaŭ okdek-jarulo, Ivo Lapenna (1909-1987), Juan Régulo Pérez, Raymond Schwartz (1894-1973), Karolo Piĉ, sepdek-jara, Julio Baghy (1891-1967).

A.- Ĉiam granda parto de la koncerna revu-numero sub la rubrik-titolo ĉefartikolo estas dediĉita al la portretito, kaj jam pro tio la revuo Iltis-Forumo fariĝas iom post iom posedinda enciklopedio. Sekvas la rubrikoj beletra forumo, memor-forumo, historia forumo, novaĵ-

forumo, recenza-forumo, kiuj ankaŭ estas minejo da informoj kaj da interesaj vidpunktoj. Tial ni ne dubas, ke kreskos la publiko, kiu konsideros, ke la periodaĵo Iltis-Forumo devas esti listigita inter la plej signifajn kulturajn esperanto-revuojn de la komenco de la dua jarcento de Esperanto. Al ĝi ni deziras longan vivon kaj kreskantan abonantaron. Hodiaŭ ni legu al vi erojn el la diversaj editoriaĵoj de Reinhard Haupenthal. La dua numero de 1989 tiel esprimis liajn bon-dezirojn al la nova prezidanto de UEA:

Cl.- Niajn bon-dezirojn al la nova prezidanto de UEA, John Christopher Wells, ni ligis kun tri konkretaj proponoj:

- realigi la eldonon de la kompleta verkaro de Hector Hodler, la fondinto de UEA, surbaze de utilaj prepar-laboroj plenumitaj de Claude Gacond;
- realigi ĉiu-jare volumon kun sciencaj kontribuoj per eldono de la prelegoj el la kongresa universitato (iama ISU);
- subteni la aperigon de **Rikolto** de Juan Régulo Pérez por faciligi la kuraĝan eldon-decidon de Gersi Alfredo Bays.

A.- En la tria numero de 1989 dediĉita al Ivo Lapenna ni trovas la respondon de UEA. Ni citu Reinhard Haupenthal:

Cl.- En Esperantujo ne ekzistas landoj foraj aŭ proksimaj, nek okazas suno-sinko. Ĝian internaciecon kaj ĝian humanismon iom spegulas nia nuna kajero: ĝi kunligas lirikojn jen de aŭtorino ĉeĥa (Jana Cichova), jen de aŭtoro bulgara (Julian Modest) kaj de du ĉinaj verkistoj: Laulum kaj Armand Su. Sam-tempe ĝi omaĝas la 80an aniverson de Ivo Lapenna, la teoriiston de la humaneca internaciismo, per fruaj liriko de William Auld, Marjorie Boulton kaj Reto Rossetti. Ni konfesas, ke ni trovas maljusta la rapidan forgesiĝon de Lapenna, eĉ kaj ĉefe en la Asocio, kiun li servis tra jar-dekoj. Jen, kion tiu Asocio respondis al la proponoj prezentitaj en la pasint-kajera editoriaĵo:

- "Oni memoru ankaŭ, ke Lins lastatempe faris esplorojn pri Hodler; mi mem (tiu estas Neil Salvesen) favorus iun biografieton. La vivo estas, se tiel diri, pli aktuala ol la verkaro."

A.- Nu, ĉu? prave aldonas Reinhard Haupenthal.

Cl.- Tre verŝajne estas la kontraŭo. La penso de Hector Hodler konservis grandan aktualecon, kaj estas tre bedaŭrinde, ke la esperantistoj ne povas mediti la artikolojn de tiu ĵurnalisto esperant- kaj franc-lingva. Ni daŭrigos niajn esplorojn pri tiu fondinto de UEA kaj inspirinto de Ligo de Nacioj.

A.- La unua kajero de 1991 raportas pri la eldonsukcesoj de Iltis-Eldonejo:

Cl.- Iltis-Eldonejo establiĝis. Malgraŭ diversaj problemoj ligitaj al nia starto ni sukcesis lanĉi en 1989 ok titolojn, tri kajerojn de nia revuo kaj diversajn katalogojn de Iltis-Libroservo.

A.- Sub la titolo **Gravaj taskoj por la germana movado** la editoriaĵo de la dua numero de 1990 interalie diras:

Cl.- La unuiĝo de la du germanaj ŝtatoj la 3-an de oktobro 1990 ne restos sen sekvoj ankaŭ por la Esperanto-movado en la du partoj de la pligrandiĝinta Federacia Respubliko Germana. Oni sentas melankolion kaj eĉ nostalgion, kiam en **der esperantist** numero 163-a oni legas la bilancon pri kvaron-jarcenta laboro kiu speguliĝas sur la 3600 paĝoj de tiu revuo... Oni sci-volas, kiel la instanca situacio de Esperanto aspektos en la nova pli granda FRG; ĉu venos ia

apertiĝo flanke de la instru-instancoj aŭ ĉu la ĝisnuna kontraŭstaro fariĝos eĉ pli granda. Se la prestiĝo kaj signifo de la germana lingvo en la mondo plifortiĝos, ĝi certe ne favoros nian ftizan Esperanton.

A.- En la tria numero de 1990 ni legas:

Cl.- Nu, por la historiaj figuroj kutime niaj juĝoj stabiliĝis kaj firmiĝis. Sed kia diskordo pri la nuno kaj la aktualo! Jen la disputataj herezoj [...] la duopo Diego kaj Piĉ. Iliaj ŝajnaj antagonismoj, kiel mi provis montri ali-loke, prezentas nur du flankojn de unu sama medalo. Rigardi nur unu, signifas neglekti la alian; rigardi neniun, dokumentas ian akutan simptonon de Esperanta analfabetismo.

A.- Fine el la editorialo de la unua numero de 1991 ni citos kelkajn liniojn:

Cl.- Nia revuo eniras sian trian jaron. La hezitaj paŝoj de la komenco iĝis pli firmaj kaj cel-konsciaj. La ĉirkaŭpalpado de la tereno cedis al konceptoj pli klaraj kaj laŭplanaj.

A.- La venontan semajnon ni ankoraŭ dediĉos al la revuo Iltis-Forumo. Interesatoj, kiuj ŝatus ricevi specimenan numeron tion esprimu tra la kanalo de la Esperanto-fako de Svisa Radio Internacia, kaj ni sendos ilian peton al la redakto de Iltis-Forumo.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras: Ĝis reaŭdo!